2 F März 1931

7-a JARO, N-o 338 — S.A.T. — LEIPZIG, 26. / 3. 1931

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE	REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerhner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio).	APERAS SEMAJNE

M 1c Paul Gottgetreu, Herrenstr. 12
2209 b

Unujara ekzekutlaboro de finlandaj Lappo-faŝistoj

La Sved-Finlanda Komitato, fondita por laŭpove organizi helplaboron en Svedio por la persekutataj finlandaj laboristoj, elektis antaŭ kelke da tempo la subskribintojn por vojaĝi Finlandon k tie pli detale esplori la cirkonstancojn. Tiu komisio nun estas plenumita, k ni povas transdoni raporton pri la observoj de la vojaĝo, kiujn ni povis fari dum la mallonga tempo de ni okupita.

Jam en la komenco ni povas konstati, ke la finlandaj laboristoj vivas en aparte malfacilaj cirkonstancoj. Malaltegaj salajroj, frakasitaj organizoj k la plej kruela teroro treege malfortigas la laboristojn k forprenas de ili eblon gardi siajn interesojn. La kapitalistoj malaltigas la salajrojn, k la laboristoj ne povas iel kontraŭbatali. Konsiderinda afero estas, ke dum la lasta duono de 1930 ne okazis eĉ unu striko aranĝita de la fakaj unuiĝoj, malgraŭ ke kaŭzoj ne mankis. La teroro de Lappo estis tro severa por ke la laboristoj kuraĝu uzi la strikon por defendi sin. Alia motivo povas esti, ke la laboristaj unuiĝoj tute estas frakasitaj.

La nombro da malliberigitoj

Nia vizito celis unue esplori, kiom multaj laboristoj pro sia aktiveco en la laboristaj unuiĝoj estas trafitaj de la leĝa brako, la amplekso de l' punoj, k la subtenbezono de alilandaj K-doj.

Koncerne la nombron da enkarcerigitoj estas treege malfacile doni ekzaktan sciigon, pro tio ke la estraroj ofte enkarcerigas k kondamnas laboristojn ĉie en la lando, k la publiko ne havas eblon fari kontrolon. Ni nur povas doni sciigon pri sendubaj k kontrolitaj aferoj.

La tempo de majo 1930 ĝis januaro 1931 montras jenan nombron da enkarcerigitoj k la distrikton, al kiu ili apartenas.

	1930 (majo/dec.)	1931 (jan.)	sume
Vasa-distrikto	233	13	246 malliberigitoj
Abo-distrikto	186	20	206 malliberigitoj
Viborg-distrikto	145	8	153 malliberigitoj
	564 +	41 =	605 malliberigitoj

Kelkaj inter la enkarcerigitoj estas liberigitaj por atendi verdikton de alta



LA MALLIBERULO — Gravuro de Zilzer

tribunalo, sed la plej multaj restas en malliberejo, inter ili 60 virinoj. Ne malpli ol 301 K-doj jam estas kondamnitaj, apartenantaj la distriktojn laŭ jena tabelo:

	1930 (majo/dec.)	1931 (jan.)	sume
Vasa-distrikto	95	22	117
Abo-distrikto	88	15	103
Viborg-distrikto	75	6	81
	258 +	43 =	301

La duono de l' enkarcerigitoj k akuzitoj estas jam kondamnita, sed la verdikto venas laŭvice al la aliaj. Estas ĉiutaga afero, ke malmildaj punoj trafas laboristojn pro ilia partopreno aktiva en la laborista movado.

La jam-kondamnitoj ricevis senescepte longdaŭrajn k rigorajn punojn: 3, 4 k 5 jaroj da malliberejo estas ordinaraj. La verdiktojn en diversaj distriktoj montras jena tabelo:

	kondamnitaj	
Vasa-distrikto	117	je 255 jaroj (por ĉiuj)
Abo-distrikto	103	je 245 jaroj 5 monatoj
Viborg-distrikto	31	je 217 jaroj 3 monatoj
Sume:	301	je 717 jaroj 8 monatoj (por ĉiuj)

Tiuj nombroj terure ilustras la senindulgajn persekutojn, kiuj nuntempe trafas la finlandan laboristan klason k devus sproni la tutmondan laboristaron unuanime starigi komunan defendon k ekonomian helpon al la viktimoj de l' Lappo-faŝismo.

Per malsato puniĝas la edzinoj k infanoj

La infanoj k edzinoj de l' malliberigitoj ne malpli suferas la kruelan persekutadon. Ĉie en la lando troviĝas granda nombro da virinoj k infanoj, kiuj suferas teruran mizeron k pereas pro malriĉo, tial ke patroj k edzoj estas forprenitaj el la hejmo k fermitaj en malliberejajn kavaĉojn. Plej malfacile estas por la infanoj, kiuj estas lasitaj hejme tute solaj. Okazis, ke la gepatroj ambaŭ, patro k patrino, enkarceriĝis k kondamniĝis por longjara mallibero. La malesperego k senhelpeco de l' infanoj nature estas senlima en tiaj cirkonstancoj.

En kelkaj okazoj la patrino sukcesis havigi al si malalte pagatan laboron k tiel forigi la plej teruran mizeron. En aliaj okazoj la komunumoj donis helpeton, sed tiuj, kie la faŝismo enpenetris, rifuzas ian ajn helpon al la malsatantaj edzinoj k infanoj. Ĉiu povas kompreni, ke la mizero estas terura, ke

ili devas esti subtenataj de la organizitaj laboristoj el tuta mondo. Havigi sufiĉan helpon en Finlando estas maleble.

Disfrakasitaj organizoj

Ni menciis komence, ke la laboristaj unuiĝoj estas grandparte disigitaj. La faka lab. unuiĝo nun malpermesita k disigita de l' estraro havis membronombron laŭ jena tabelo:

1920	59 470	membroj
1921	48 589	„
1922	48 176	„
1923	48 148	„
1924	47 312	„
1925	50 472	„
1926	62 058	„
1927	75 846	„
1928	90 231	„
1929	70 435	„
1930	54 791	(1-a kvaronj.)

La lasta oficiala statistiko certe estas erarmontra, ĉar jam tiutempe la tutlanda lab. unuiĝo estis detruita pro internaj politikaj bataloj inter komunistoj k socialdemokratoj. Ne malpli ol 8 fakaj unuiĝoj eksiĝis la tutlandan unuiĝon, poste la socialdemokrate tendencaj laboristoj fondis novan landampleksan unuiĝon kun, laŭ informoj, 21 000 membroj. Ni ne volas ĉi tie prijuĝi, kiuj inter la batalantoj estis plej kulpaj pri la disigo de l' organizo. Ni nur konstatas fakton. Bedaŭrinde estas tamen, ke la Lappo-faŝistoj ne renkontis unuigite batalantan laboristan klason. Estas tiu kaŭzo, kiu faciligis la faŝistan venkon super la finlanda laboristaro.

Malsat-salajroj

La malbonaj organizaj kondiĉoj rezultigis ankaŭ salajran malaltigon. Ĉe multaj laborejoj la salajro pagata estas malaltega. Sekvantaj informoj pri salajroj en diversaj industrioj, kiujn ni havigis al ni dum nia vizito en Finlando el plene fidinda fonto, donas klaran bildon.

En la metalindustrio la faklaboristoj havas mezan salajron de 8,50 markoj[1] hore. Se oni enkalkulas la helpantojn, la salajro ne atingas pli ol 5—6 markojn hore. Dum la Lappo-periodo la salajroj malaltiĝis je ĉirkaŭe 10%.

En la konstru-industrio la meza salajro por faklaboristoj estas 8 markoj hore, helplaboristoj ricevas 4—5 markojn. La tiu-industriaj salajroj malaltiĝis dum la Lappo-periodo je ĉirkaŭe 30%. Pri tiu malaltiĝo kulpas ne nur la Lappo-potenco, sed ankaŭ la ekonomia krizo, kiu trafis tiun industrion.

En la teks-industrio viroj-faklaboristoj ricevas 5—6 markojn hore. La virinoj havas salajron de 2,20—2,30 mk. hore. Maŝinistoj, riparistoj kc. en la teksindustrio akiras hore ĉ. 8 markojn.

La laboristoj en la paperindustrio havas salajron, kiu superas tiun de l' teks-industrio je ĉ. 10—15%. Tio dependas de la pli bona situacio en tiu industrio. Tamen lastatempe la ekonomia krizo trafis ankaŭ la paperan industrion; tial oni antaŭvidas ankaŭ tie salajran malaltigon.

En nutraj-industrio viraj bakistoj estas pagataj per 410 mk. semajne. Virinoj ricevas 280 mk. en la sama tempo. Ambaŭ grupoj povas atendi plialtigon de l' salajro. La konserv-laboristoj akiras 460 mk. semajne. La karamel-industrio, kiu plejparte okupas virinojn, pagas al ili ĉ. 120 mk. semajne.

La tramkondukistoj en Helsinko ricevas 2100 mk. monate. La konduktoroj (ĉefe virinoj) havas salajron de 900 mk. monate.

En supraj industrigrupoj ankaŭ popeca plipago estas enkalkulita tie, kie oni aplikas popecan laboron; ĉi tiu preskaŭ nenie estas aplikata. Sed la labortakto estas rapida kvazaŭ laŭ popeca laboro.

Por mizerulo j-senlaboruloj laboro estas aranĝita, sed ne por ĉiuj. En Helsinko tia laboro estas pagata per 3 markoj hore. En la kamparo la salajroj estas pli malaltaj.

La dirito povas esti sufiĉa. Nia raporto klare montras, ke la persekutataj finlandaj laboristoj bezonas fortan apogon, plej grave ekonomian de la alilandaj laboristoj. Ili vivas sub la plej teruraj cirkonstancoj, k se ne sufiĉa helpo venos al ili, estas supozeble, ke la finlanda laborista movado tute pereos k paraliziĝos dum multaj estontaj jaroj. Tio ne devas okazi; tial ni alvokas al ĉiu laboristo malgraŭ tendenca diferenco subteni per ĉiuj fortoj la kolektadon de mono, kiun aranĝis la Finlanda Komitato. Ĉiuj garantiaranĝoj estas jam prizorgitaj, kiuj ebligas al la Komitato disdoni la monon tie, kie ĝi estas pleje bezonata. Solidara helpo estas necesega, neevitebla en tiu okazo. La finlandaj klask-doj devas esti subtenataj.

Stokholmo, la 21-an de febr. 1931.
La Komitato: John Andersson (sekretario de S. A. C.); G. Jönsson (ekspedisto de telegraf- k telefonlaborista unuiĝo).

Tradukis el sveda lingvo Adriano (17 053).

[1] 100 markoj finlandaj = ĉirkaŭe 2,5 dol.

Kiel la nuna ekonomia malviglo efikas sur la instruistan vivon en Japanio

La terura ekonomia malviglo kaŭzas senlaborulojn en diversspecaj fakoj de profesio k metio, jam ne parolante pri liberaj laboristoj. Ankaŭ inter instruistoj ĝi kaŭzas multajn malfacilajojn k kompromitas ilian ekonomian vivon.

Elementaj lernejoj

Pro la malfacila ekonomia stato de l' vilaĝoj, la lernejoj subtenataj de vilaĝaj komunumoj multe suferas. Iuj vilaĝaj kasoj tute ne kapablas pagi salajron al instruistoj, kiuj jam sen tio estas sufiĉe mizeraj; la vilaĝaj kasoj ne havas sufiĉan enspezon, k tial ili povas pagi al siaj lernejinstruistoj ne pli ol duonon, trionon aŭ kvinonon de la salajro k iuj el ili eĉ neniom pagas dum monatoj. En urboj k en prosperaj vilaĝoj, la instruistoj ricevas sian plenan salajron k sufiĉe bonstate vivas.

En la distrikto de Tamba lastatempe okazis malĝojiga ridindaĵo. Iu vilaĝo estis en ekonomia krizo k ne povis plu havi estron en iu elementa lernejo, pro tio ke li dum multaj jaroj servis k ricevis sufiĉe bonan salajron. La vilaĝestro volis forigi la lernejestron for de lia lernejo, sed la lernejestro estis tre bona k klera homo, kiu havis la respekton k amon de la vilaĝanaro, k la vilaĝestro ne povis trovi ian motivon por forpeli lin. Li mem sciis, kiel taŭga li estas. Tamen la vilaĝa kaso estis tro malriĉa por daŭre dungi la lernejestron. La vilaĝestro ekpensis pri preteksto por lin forpeli. Li subaĉetis lernejserviston k igis lin ŝteli la fotografaĵon de la imperiestro el la lernejo.

Nu, en Japanio la foto de la imperiestro estas traktata kiel lia persono mem. En preskaŭ ĉiuj lernejoj estas la fotoj de la geimperiestroj, kiujn oni metas en speciale por ili konstruitajn loketojn en lernejoj, k tage k nokte instruistoj gardas ilin. Tiuj fotoj estas metataj sur altaĵojn en la tagoj de naciaj festoj, k de la estro ĝis la plej malgranda lernanto, ĉiuj kune respektsalutas antaŭ ili (imagu kiel en antikva Svisio Gesler metis, laŭ legendo, sian ĉapon sur stangon en placo, k ordonis, ke la popolo salutu ĝin). Laŭvice instruisto devas restadi la tutan tagon k tutan nokton en lernejo por gardi la foton, k eĉ dimanĉe, k eĉ dum libertempoj en somero k vintro, dejoranto ĉiutage k ĉiunokte restadas en la lernejo. Se io, ekzemple fajrego aŭ alia katastrofo okazos, tiam la dejoranta instruisto devas antaŭ ĉio kunporti la foton kun si por translokigi ĝin en sendanĝeran lokon.

Ne estas tre miriga afero en Japanio, ke dejoranta instruisto brulmortas kunportante la foton en fajrego; forportado en tia okazo ja estas la unua devo, k tia mortinto estas laŭdata kiel al sia devo plej fidela instruisto, kies morto estas solene funebrata de la oficistoj k

lernejanoj de la tuta urbo aŭ vilaĝo. Kontraŭe se, en ia okazo de katastrofo, instruisto dejoranta saviĝis mem k ne povis savi la foton, tiam li estas ege riproĉata de multaj flankoj kiel malfidela instruisto sentaŭga.

Nun en la lernejo, kie nia kompatinda estro servadis tiel multjare, la foto estis forŝtelita. En tia okazo la lernejestro estas ĉiam responda pri la okazintaĵo. La forpelo de nia fidela lernejestro for de lernejo, kie li servadis tiel sindone, estis rigardata kiel lia ĝusta merito pro tia gravega kulpo k tiu plej hontinda afero. La vilaĝestro nun libere spiris, ĉar li de nun povos uzi la monon (kiun li antaŭe devis doni al la lernejestro) por "pli urĝaj vilaĝaj bezonoj", kiel la vilaĝaj konsilantoj pensis. La lastaj ne sciis la ruzaĵon de la vilaĝestro, kiuj kompatis la lernejestron pro lia neatendita malfeliĉo, dum aliaj koleris je li pro lia senrespondeco kiel lernejestro. Sed ili unuanime sekrete ĝojis, ke ili ekhavis la monon por uzi por vilaĝa afero, kiu estis pli grava.

Tamen la esploro k ekzameno posta malkaŝis la aferon. La lernejservisto, kiu pro mono tiel senhonte perfidis sian bonan lernejestron, ne sin povis deteni, kiam demandita: li elkonfesis ĉion. Kaj nun trafis ilin la sorto. La vilaĝestro, kiu kondamnis la lernejestron, estas mem en katenoj. Tamen la legantoj devas scii, ke neniom da mono li por si mem uzis. La malsaĝa vilaĝestro penegis plenumi sian devon kiel estro en la vilaĝo, k por tion fari li bezonis monon; li estas "fripono" falinta en sian propran kaptilon.

Ankaŭ multaj liceoj, inter ili porknabinaj liceoj, ne restis ekster la influo de l' ekonomia malviglo. En multaj tiaj liceoj subtenataj de grandaj urboj, gubernioj aŭ de la Departemento por publika edukado, aŭ de la Departemento de l' Imperiestra Kortego, ja oni ne povas rekoni malfacilon ekonomian. Ne, en la tempo, kiam ĉiuj varoj malkariĝas, la salajro de la instruistoj en tiuj prosperaj lernejoj ne malpliiĝas; do ili nun havas pli bonan vivkondiĉon, k ne estas tre maloftaj faktoj, ke meze de tia malfacila tempo iuj el ili konstruas sian propran domon, aĉetas bienon aŭ ŝtatan obligacion.

Sed se ni turnos nian okulon al privataj liceoj k knabinliceoj, ni trovas timigan kontraston. Inter privataj mezlernejoj nur tiuj, kiuj estas subtenataj de l' burĝaro aŭ alilanda kapitalo (kristanaj lernejoj, kiuj ricevas subtenon de francaj katolikoj k usonaj protestantoj) ĝuas tiel bonan staton kiel la supre menciitaj registaraj mezlernejoj. Sed en multaj privataj lernejoj, kie la honorario de la lernantoj estas la sola enspezo, tie la ekonomia stato estas tre malbona. En tiuj lernejoj la salajro de l' instruistoj estas terure malalta eĉ en ordinara tempo, k la nombro da lernantoj ne estas tre granda. En tiuj ĉi 2—3 jaroj, jam kelkaj mezlernejoj privataj fermiĝis pro ekonomiaj malfaciloj, aŭ en iuj lernejoj la nombro da klasoj malpliiĝis, kelkdek instruistoj perdis sian okupon. En februaro registaraj k privataj lernejoj varbis novajn lernantojn, kiuj enklasiĝos en aprilo. En iuj registaraj, kristanaj k burĝaj mezlernejoj jam oni anoncas, ke varbitoj estas pli multaj ol la nombro da akceptotoj. En kelkaj lernejoj la varbitoj estas kelkoble pli multaj ol la akceptota nombro. Tamen multaj privataj mezlernejoj ne povas havi varbitojn; multaj el ili atendas tiujn, kiuj malsukcesis eniri en "pli bonaj lernejoj" k tial ili varbas en la fino de marto aŭ eĉ en aprilo, kiam "pli bonaj lernejoj" jam komencas sian lecionon. Sed nun la ekonomia krizo tiel minacas ilin, ke ili ne povas havi multan esperon eĉ post marto. Ĉar iuj el la knabinlernejoj jam en 1930 povis havi nur 20 aŭ 25 varbitojn, dum ili varbis 100 aŭ 150 novajn lernantojn. Nun multaj lernejestroj el tiuj privataj lernejoj dissendas instruistojn al elementaj lernejoj por propagandi pri siaj lernejoj.

(Finota.)

Sennaciulino en Japanio.

SENLABORECA ASEKURO

En Usono, kie ankoraŭ preskaŭ ne ekzistas ia leĝa senlaboreca asekuro, multaj personoj agadas, por ke la ŝtato faru ion por la senlaboruloj. La proponantojn de tia leĝo oni povas dividi je tri grupoj: Unua, la t. n. filantropoj, kiuj kortuŝitaj pro la grandega sufero de l' senlaboruloj urĝas la leĝofarantojn ion fari por la plej trafitaj familioj. Dua, la ekonomiistoj, kiuj traktas la problemon laŭ kvazaŭ-scienca maniero k argumentas, ke estas tre valora por la industrio, se dum senlaboreco la laboristoj ricevu ian subtenon, por ke malsato k mizero ne malfortigu ilin. Se la laboristo returnas sin al la laboro, poste li devas esti forta k lerta, ĉar tio estas en la intereso de l' industrio. Tiuj ekonomiistoj nomas sian metodon "konservado de homa materialo".

La tria grupo favoras leĝan senlaborecan asekuron, ĉar ĝiaj reprezentantoj timas, ke se la ŝtato ne zorgas pri siaj senlaboruloj, tiam ili eble ribelos aŭ faros revolucion.

Tiuj tri grupoj tre bone komprenas la danĝeron, kiu kuŝas en senlaboreco por la kapitalista klaso. Konservi tiun ĉi klason k produktadsistemon, estas ilia ĉefa intereso, k pro tio kapitalistaj filantropoj, ekonomiistoj k sociologoj treege estimas tian leĝon.

Ŝtata soci-asekuro konservas la "homan materialon", mortigas la revolucian spiriton k ebligas al la kapitalista sistemo pli longan vivdaŭron. En Germanio k Anglio senlaborecaj asekurleĝoj ekzistas jam delonge. Antaŭ kelka tempo Lojd Ĝorĝ (Lloyd George), angla ĉefministro dummilita, diris, ke se ne ekzistus en Anglio tiuj leĝoj, en Anglio jam antaŭ pluraj jaroj estus okazinta la revolucio. La prudentaj kapitalistoj en Usono ofte ripetas tiujn vortojn de Lojd Ĝorĝ en siaj kunvenoj por konvinki obstinulojn pri la saĝo doni prefere iom nun anstataŭ ol perdi ĉion poste.

Se estus vere, ke en Anglio k Germanio la laboristoj ricevas sufiĉan senlaborecan subtenon, kiu ebligas al ili vivi kiel homoj, tiuokaze ŝtata asekuro allogus ankaŭ la usonajn laboristojn. Sed tio ne estas vera. Eĉ se la germana k angla laboristo laboras, li ne perlaboras sufiĉe por kovri ĉiujn neprajn vivbezonojn. La mono, kiun la laboristo ricevas, se li estas senlabora, prezentas nur $\frac{1}{3}$ aŭ $\frac{1}{2}$ de sia meza salajro. Tiel ne estas malfacile por kompreni, ke la ricevita sumo tute ne sufiĉas.

Ŝajnas al mi, ke la kapitalistoj en Germanio k Anglio povas esti pli dankaj, ke tiuj leĝoj ekzistas, ol la laboristoj. Tiel longe kiel kapitalismo ekzistos, la laboristoj devos malsati, ĉar nur per malsato povas la mastro ekspluati la sklavon. Ne ekzistas solvo de la senlaboreca problemo en la kadro de la kapitalisma produktadsistemo. Klarigado pri tiu ĉi fakto estas la tasko de l' socialistoj.

Senlaboreca asekuro en Germanio k Anglio estas fiasko, k ĉiam estos fiasko, tiel longe, kiel kapitalismo ekzistos. Dum senlaboreco la laboristoj kutimiĝas vivi eĉ pli mizere ol kiam ili laboras. Ili kutimiĝas al pli malalta vivnormo anstataŭ batali por pli bonaj

Ne pensu kiam estos tro malfrue

pri tio atentigi novajn esperantistojn pri la ĉiusemajna legaĵo de l' proleta esp-isto — **"S-ulo".**

Ankaŭ $\frac{1}{4}$-jaraj abonoj estas akceptataj.

Nomojn k adresojn de varbitoj sendu kun indiko "Varbkonkurso al "S-ulo", samtempe kun la pago, al Administrejo de SAT en Lajpcig, k vi ricevos post kelkaj monatoj belan rekompencon!

salajroj. Kaj tiam ne estas mirinde, ke la salajroj restas malaltaj.

La espero, ke la ŝtato plibonigos la soci-progresajn leĝojn, estas granda danĝero por la laborista klaso. Ĉu la laboristoj neniam komprenos, ke sociaj reformoj estas ĉiam pli valoraj por la kapitalistoj ol la laboristoj? Ne estas profite por ni daŭrigi la vivon de la kapitalismo. Estas nia tasko forigi ĝin. Estas iluzio troestimi la valoron de socireformoj, k tial ni ne devas esperi gajni ion per ili.

Konstanta batalo por plimallongigo de l' laborhoroj k pli altaj salajroj estas la nuro farebla. Kial la laboristo ne volas aŭ timas batali kontraŭ la kapitalismo? Tial li ankaŭ meritas nenion alian ol malsati k suferi. Kial senlaboreco? Ĉar ekzistas kapitalismo! Ĉu tio ne estas simpla?

G. J. Kroes (10 472), Novjorko

okazis agititaj kunvenoj por la liberigo de l' politikaj malliberuloj kun minacoj kontraŭ la estraroj, se la liberigo ne estus elakirita. En Andaluzio pli ol centmil terkulturistoj estas senlaboraj, t. e. 12 % de l' laborista loĝantaro.

J. P.

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

Laboristaro k kontraŭfremdula agitado en Francio

De kiam montriĝis la unuaj reefikoj de l' tutmonda ekonomia krizo en Francio k senlaboreco fariĝis atentinda problemo, ekaperis signoj plifortigitaj pri fremdul-malamo inter la proletoj mem. Kaj tiuj signoj eĉ rimarkiĝas en revoluciaj laboristaj organizoj, kiuj subtaksas la signifon de l' batalo kontraŭ la ŝovinismo en la laborista klaso. La fremdaj laboristoj ne nur estas malafablege traktataj, eĉ insultataj en la laborejo de l' mastro, submastro k ĉef-laboristo, same ĉe la publikaj entreprenoj (transportiloj, dungoficejoj, poŝtotelegrafejoj, policejoj ktp.), sed ili eĉ ne ricevas ĉiam en la lab. kunvenoj k manifestacioj la fratan akcepton, kiu altirus ilin en la lab. organizojn. Kiam ili permesas al si kritikojn, okazas, ke eĉ membroj de revoluciaj organizoj diras al ili rekte en la vizaĝon, ke ili politikumu . . . en sia lando!

Jam en la lernejo la franca lab. infano ekscias, ke ĉie en la mondo regas bruta diktatoreco, de bandaĉo aŭ de partio, k ke nur Francio havas noblan k grandaniman konduton: la lando de l' revolucio de 1789, de l' demokratio, de l' homaj k civitanaj rajtoj, de l' azilrajto k gastigemo al politikaj elmigrintoj. Ankaŭ similon oni legas konstante en la burĝa gazetaro. Kaj hodiaŭ oni aldonas tiun argumenton: "ĉio estus malpli kara en nia riĉa lando, se la fremduloj estus forpelitaj, kiuj rifuĝintaj de sialandaj tribunaloj vivas libere ĉe ni." La gazetaro provas kredigi ankaŭ, ke preskaŭ ĉiuj ŝteloj k krimoj estas ŝuldataj al la fremduloj; ĉe politikaj manifestacioj oni arestas la alilandajn K-dojn, kio donas okazon al la gazetaro postuli severan "purigon" kontraŭ tiuj, kiuj "forpelitaj el siaj landoj preparas ribelojn k revolucion en Francio". La burĝaro tiele laŭgrade sukcesas krei ŝovinisman spiritostaton ĉe la laboristaro mem, el kiu la plej malgranda parto komprenas la verajn kaŭzojn de l' nuna krizo.

M. P.

Aĉetu k aĉetigu

NI LEGU!

de Brunulo

la ŝatata Legolibro de l' SAT-anoj, kies 3-a eldono korektita, reviziita, ilustrita, bele kartonita, devus troviĝi en la manoj de ĉiu perfektiĝanta esperantisto.

112 paĝoj 12×17 cm Pr. 1 mk.g.

Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27 (Germ.)

Sindikata propagando per filmoj

Du propagandaj filmoj eldonitaj de l' holandaj sindikatoj estis prezentataj je 24. februaro en la popoldomo de Bruselo (Belgio). Unu el ili "Ŝtalpugnoj", estas kreita komisie de l' Metalurgista Centro, la alia, "Triumfo", okaze de l' 25-jara datreveno de l' holanda sindikat-konfederacio. Du kunlaborantoj de l' socialista jurnalo "La Popolo" (Het Volk) redaktis la scenaĵon. La aktoroj estas laboristoj ĉe laboro, batalo k ripozo. La filmo "Triumfo" montras la kontraston inter la laboristoj antaŭ 25 jaroj k hodiaŭ, tion, kio estas akirita per 25 jaroj da batalo (lab. libertempoj, maljunul-pensioj, sociaj leĝoj ktp.). En "Ŝtalpugnoj" estas priskribita la vivo de l' metalaboristoj.

Ppl.

La problemo de l' senlaboreco k salajraj reduktoj en Germanio

La Komitato de l' Ĝenerala Sindikata Konfederacio Germania esprimis sin per rezolucio por la kvintaga semajno aŭ 40 laborhoroj, kun la celo redukti la senlaborecon. — En la tuta lando la laboristoj kontraŭstaras al la malpliigo de siaj salajroj. Malgraŭ la granda nombro da senlaboruloj pluraj teks-fabrikoj en Saksio estas paralizitaj sekve de striko, ĉar la laboristoj rifuzas akcepti la salajr-malpliigon.

St.

Laborista mizero en Hispanio

La urbestraro de Madrid konsentis krediton de 8000 pesetoj por la familioj de l' viktimoj de la lastdecembra revolucia movado. En Madrid k Logrono

Tagoj el mia fraŭla vivo

Mi naskiĝis en malbelega k malnovega domaĉo, kiu staras apud arbaro en la plej malriĉa k preskaŭ sovaĝa angulo de Limuza regiono, troviĝanta en centro de Francio. Tie depost jarcentoj miaj gepatroj, avoj k praavoj kulturis vastan terbienon kiel duonposedantoj[1]. Kompreneble devante fordoni la duonon el siaj produktoj ili ĉiam vivis en la plej malbonaj kondiĉoj, preskaŭ kiel primitivaj homoj, dum la riĉa bienulo (nobelaĉo) en luksa palaco ĝuis preskaŭ paradizan vivon.

En tiu mizera atmosfero, inter la dorlotado de l' bonaj geavoj k la kanto de la birdoj, mi pasigis miajn unuajn k feliĉajn tagojn. Sed iunokte mi vekiĝis subite! Kio okazis? mi ekaŭdis plendojn k plorojn. Kia dramo! Veninte de foiro riĉa veturigisto kaŭzis per akcidento la morton de mia patro. Nun antaŭ kadavro vidvino k kvin infanoj ploregis; en la domaĉo ne estis mono k baldaŭ mankis ankaŭ pano.

Mi estis dekjarulo, kiam mi prenis saketon sur la dorson k vagis de pordo al pordo almozpetante pecon da pano. Iun tagon mi renkontis kompatemajn homojn, kiuj laŭ mia peto havigis al mi laboron, k de tiu momento mi estis laboristo . . . Dek jaroj pasis; en mezo de tiu bona naturo mi grandiĝis kiel sovaĝa vegetaĵo. Sed antaŭ mi ekestis nova dramo! Ĉie oni aŭdis sonorilojn; ĉie oni vidis larmojn, ĉar eksplodis la milito! La registaro, kiu forgesis min dum mia mizera juneco, tamen nun ekkaptis k pelis min al la limo.

Dum tri jaroj mi pasigis la vivon en kotaj tranĉeoj, kie la du ŝafaroj ambaŭflanke subteriĝis, mortigis unu la alian. En miaj brakoj ofte mi premis mortvunditajn amikojn, viŝante fluantan sangon k aŭdante iliajn lastajn parolojn k ĝemojn. Sed iun tagon en mezo de kanontondrado mi ankaŭ fermis la okulojn k vekiĝis nur en malsanulejo. Post du jaroj da kuracado mi revenis hejmen per du lambastonoj. Mi estis 25-jara.

*

Post reedukado en mia malgranda vilaĝo, mi fariĝis ŝufaristo, k sola en mia malluksega kabano mi ofte enuis. Kiom mi bedaŭris ne povi legi, ĉar

[1] Terkulturistoj prilaborantaj bienon, kies produktoj je duono apartenas al la bienposedanto.

neniam ĉeestinte la lernejon mi estis analfabeto! Tamen iam cerbumante mi pensis pri venontaj tempoj. Ĉu mi devas resti sola kiel vulpo en sia truo, aŭ ĉu mi devas edziĝi? Ĉu vere mi rajtas elekti edzinon, kiu eble naskos al mi idojn, kiuj certe fariĝos laborbestoj por riĉuloj aŭ karnputraĵo en venonta milito? En mia spirito voĉo respondis: ne! Tamen ĝisvespere mi pensis pri tiu stranga afero. Kial estas riĉaj k feliĉaj homoj, dum aliaj estas tiom malfeliĉaj? Tion mi ne povis kompreni. Tial en mia cerbo ekbrilis lumradio k post vespermanĝo mi iris al instruisto k petis lernolibrojn, por instrui min. Levante la ŝultrojn, la bonulo respondis: Sole mi dubas, ke vi sukcesos.

Post tiu tago mi aranĝis apartan vivon: 8 horojn mi laboris, 2 horojn ripozis k 4 horojn lernis. Mi studis francan lingvon k sociajn temojn; kiel arton mi elektis la muzikon. Post 5 jaroj da lernado la urbestro en Miale (Miallet) petis min gvidi urbfanfaron. Kiel muzikisto mi jam estis internaciisto.

Sed iutage, en majo 1927, leginte laboristan gazeton mi ekvidis: "Esperanto — lingvo internacia". Tuj mi petis klarigojn al K-do Glodo, k post ses monatoj mi fariĝis SAT-ano, LEA-ano k abonis "S-ulo"n. Mi certe trovis la rektan vojon, k mi bone konscias, ke mi ne plu estas la sama homo kiel antaŭe. Efektive se materie mi vivas plue en ĝisnunaj kondiĉoj, se mi estas devigata perforte akcepti senmurmure la burĝan leĝaron, spirite mi jam vivas en nova mondo. Mi ne plu vidas limojn nek lingvobarojn; mi estas nova homo k nur nun mi rajtas edziĝi. Sed ĉu tiu edzino devas esti ordinara virino? Tute ne. Tamen ŝi ne bezonas havi ĉiujn kvalitojn, kiujn postulis de ŝi K-do Kozako en iu tre kontraŭdirita artikolo aperinta en "S-ulo". Ŝi devas nur esti vera SAT-anino, virino kiu naskas al mi idojn, vagontajn tra la mondo, klerigante aliajn homojn, sciigante novajn ideojn k starigante novan mondon, kie la paradizo ne estas en la ĉielo aŭ malantaŭ la tombejo, sed male estas lokita surtere, k ni vivas en ĝi inter la naskiĝo k la morto.

J. V. (11 774).

Necesas objektiveco!

Ni mem ne povas kontroli de ĉi tie, ĉu la artikoloj, kiujn oni sendas al ni, estas verkitaj laŭvere.

La raporto, pri kiu temas en sekvanta letero, aperis en n-oj 327, 330, 332 k 333 k estis originale verkita de SAT-ano. *Red.*

"... La finita raporto publikigita en "S-ulo" sub la titolo "Hispanio — ĝia evoluo de 1923 ĝis hodiaŭ" estas granda trompaĵo. Legante tiajn aĵojn, mi demandas al mi mem, ĉu la pli multaj raportoj en via gazeto eble estas tiaspecaj. Se la ceteraj informantoj ne estas pli veremaj, via organo bedaŭrinde rezulte trompas la legantojn. La dirita raporto estas ĉeno el rakontoj de sonĝanto. Ĉio estas fantazio k imagado ..."

"Madrido, ... Fel. Martin."

Diverskoloraj okulvitroj

J. Burger (601).

Foje mi kun du amikoj
iris dum somera tag'
tra herbejoj k erikoj
ĝis la bord' de bela lag'.
"Restu ni, ĉar tie ĉi
ĝusta loko por ni tri
ĉe la flor' en blukolor'!"
diris mi kun grandfervor'.

"Tiu flor' kun bonodoro"
kontraŭdiris nun kunul',
"estas verda de koloro;
ŝajne trompas vin okul'!"
Tria kriis tuj el ni:
"Vi jam estas en ebri';
la kolor' de tiu flor'
estas flava kiel or'!"

Inter ni disput' estiĝis
pri kolor' de floro nur.
Stratobub' alproksimiĝis
netuŝita de l' kultur'.
Tuj pri ni laŭtridis li,
diris eĉ kun ironi':
"Je honor', — jen blanka flor',
nur: okulovitrojn for!"

Okulvitroj politikaj:
malutil' por proletar'!
Fratbataloj fanatikaj,
sed nenie solidar'.
Tial nuna ĉeflabor'
estu: Disigaĵojn for!
Por la unueca front'!
Por pli bela homestont'!

MI VOLAS SCII...

Respondo al K-do 8384

La demando, al kiu respondas ĉi tiu K-do, aperis en n-o 321, t. e. antaŭ 4 *monatoj;* plie la respondinto fakte ne respondas la demandon*. Ni tamen konigas resume k mildigite lian skribaĵon. — *Red.*

Laŭ mi plej multaj socialdemokratoj meritas esti nomataj "socialfaŝistoj". En Bulgario ekz. la sola socialdemokrata ĵurnalo "Narod" ĉiurimede penas kalumnii Sovetion k laŭdas la ĉi tiean faŝistan registaron. Niaj socialdemokratoj konsideris la proponon de komunistaj parlamentanoj doni al senlaboruloj 100 milionojn da levoj, kiel provokon; en 1923 la soc. dem. partio subtenis la policon en ĝia agado kontraŭ la ribelantaj laboristoj. Alilande — Makdonald pafmortigas ribelantajn naciistojn en Hindio k duobligis dum sia regado la senlaborulan nombron. En Germanio iuj soc.-demokratoj kune kun la polico dispelis strikantajn ministojn antaŭ nelonge. Konklude: la soc.-dem. partioj sub masko de paco, senrevolucia plibonigo de l' proleta vivo kaŝas ofte sian reformismon, oportunismon k kontraŭlaboristecon. Ĉi-dirito ne rilatas klaskonsciajn socialdem. laboristojn, sed pleje partigvidantojn k burokratojn-karieristojn, kiuj abundas en tiuj partioj. Tamen estas multaj esceptoj, kiel Vanderveld, kiu tre bone parolis pri Sovetio, k "Ĉiutaga Heroldo" (Daily Herald) en Anglio, kiu ofte aperigas favorajn artikolojn pri Sovetio k. a. Miaj diroj ne estas akuzo, sed nur konstato.

16 988 (Bulgario).

* K-do 8384 demandis, kion signifas la vorto "faŝisto" aŭ "social-faŝisto", atentigante, ke en Germanio la tielnomataj "faŝistoj" (naci-socialistoj) akre batalas *kontraŭ* la socialdemokrata partio.

Por nia medito

La katolika religio estas instrukcio pri almozpetado je la paradizo; estus ja tro maloportune ĝin meriti. La pastroj estas la perantoj por tiu almozpetado.

Ŝopenhaŭer *(Schopenhauer).*

La aliaj partoj de l' mondo havas simiojn; Eŭropo havas francojn. Tio kompensas. Ŝopenhaŭer.

POR NIA DISTRO



Ne modelo

Hundodresisto iam prezentis hundon, antaŭ Mark Tŭen (Twain), pri kiu li estis eksterordinare fiera.

"Kiam mi diras al la hundo: saltu 'trans la fosaĵon", li klarigis, "tiam ĝi saltas k kiam mi ordonas al ĝi: manĝu bananon — ĝi abomenas ilin — tiam ĝi formanĝas ĝin! k kiam mi metas ok kolbasojn antaŭ ĝian nazon k avertas: Ne ektuŝu! tiam ĝi lasas ilin kuŝi k eĉ se ĝi malsatus ĝis morto!"

"Hm", faris Mark Tŭen, "mi ĉiam tre multe ametis hundojn, sed nun mi ekkonas, ke inter ili estas ĝuste samaj besto-malsaĝuloj, kiaj estas inter la homoj."

Belega romano! JACK LONDON
LA FERA KALKANUMO
Tradukita el la angla de G. Saville.
368 paĝoj. Formato 12×18 cm.
Prezo 2,60 mk. g., (bindita 3,50 mk. g.)
Mendu tuj ĉe Administracio de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig O 27, aŭ Sidejo de SAT, 23, rue Boyer, Paris XX.



Redakcia adreso: A. SCHWARZ, Lerchenstr. 14
Neckarsulm (Germanio).

Scio aŭ volo?

(Fino. Vd. n-on 334.)

La laboristaro ne bezonas leksikonulojn, sed klasbatalantojn. Certe tiuj ankaŭ devas posedi scion, mi jam diris. Por tio la popol-altlernejoj faras utilan laboron. Sed ili preterlasas, eduki al esplora pripensado, al juĝkapablo; tio signifas: eduko al kapablo: esploradi faktojn, neinfluite de iu teorio, de iu antaŭjuĝo; eduko al sendependa pripensado, kiaj ajn konkludoj k precipe, kiaj ajn decidoj rezultas el tia esplorado. Juĝkapablo estas necesa eco de revoluciulo, de laborista gvidanto.

Sed la juĝkapablo estas senvalora, se ne ekzistas la volo efektivigi la ekkonon. Ni do vidas, ke la opoziciaj socialdemokratoj en Germanio (en aliaj ŝtatoj estas ja tute simile) plej ofte analizas trafe la situacion, tamen ĉiam, se temas pri decido, parolas "jes-ne". Tio havas kiel efikon, ke la reformistoj gvidas la laboristaron de malvenko al malvenko. Do, la revolucia estro bezonas ne nur juĝkapablon k scion, sed ĉefe karakteron. Tiun oni ne povas lerni nek instrui, sed oni povas ĝin ekzerci k plifortigi — ne per duonjara kurso, sed nur per persista eduka laboro ĉe si mem k ĉe siaj K-doj. Tiu laboro estu la tasko de l' revolucia junularo, de junularo inda esti avangardo de l' proletaro.

Al la rusa junularo *Lenin* ne rekomendis librojn k broŝurojn, sed li konsilis bonstatigi legomĝardenojn, zorgi pri puro en laborejo k hejmo, instrui skribon al analfabetoj. Tio signifas: komenci per la plej simplaj, flankaj aferoj, lerni: esti preciza, orda, fidinda, fidele plenumi promeson, igi sian propran vivon socialista. Estas malfacila tasko, sed estas tasko, kiun povas plenumi ĉiu juna socialisto, ĉiu grupeto da ili. Do, ni ne postulu grandioze agitadon, sed disdonu k vendu mem la agit-materialon de nia movado. Ni venu akurate al niaj kunvenoj, ni plenumu precize la funkciojn donitajn al ni, anstataŭ plendi pri malbona traktado fare de la aliaj. Ni ne moku pri "burĝeco", dum ni mem agas laŭ burĝaj kutimoj; ni forjetu tiujn. Ni ne ekspluatu niajn edzinojn, infanojn k pli junajn K-dojn. Ni batalu kontraŭ niaj ekspluatantoj per eksiĝo el eklezio, per alkohol-abstinenco, do, per rimedoj, kiujn ni povas efektivigi senprokraste. Ni ne babilaĉu, sed agu! Nur per tia mem-eduko estos hardata la decidemo agi revolucie, estiĝos la fera volo, venki ĉiujn malfacilajojn, ĉiujn personajn malviglojn, ĝis

"ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
atingos la celon en gloro."

16 900.

Dumferia interŝanĝo

Kursanoj de Gross-Ottersleben, Bez. Magdeburg, Germanio, estas pretaj gastigi kelkajn eksterlandajn Ge-k-dojn, precipe junajn. Dum 8 tagoj ili ricevos senkoste loĝon k manĝon. Kondiĉo: antaŭe interkonatiĝi perletere. Skribu al Francisko Moravec, Gross-Ottersleben, Bez. Magdeburg, Germ. (14 624).

K-do Moravec prezentas demandon: "Antaŭe necesas klarigi, kio estas junularo?! Ĉu la fiziologie junaj K-doj aŭ ankaŭ la maljunuloj, sed junaj en koro ktp.? La laborkondiĉoj, kompreneble ankaŭ la celoj, estas por ambaŭ tre diversaj." Mi atendas respondajn artikoletojn ĉi-temajn por enmeto en "J. P." *A. S.*

LA SEKSA PROBLEMO

La junularo devas en ĉiuj tempoj venki la mondon! Tio estas simpla konsekvenco de la evoluo k la cirkulado de la generacioj. Sed la nuntempa laborista junularo devas per duobla maniero venki la mondon, ĉar samtempe ĝi devas venki la socion al la socialismo. Estas granda k malfacila tasko, kiun la historia evoluo metis sur la ŝultrojn de la laborista klaso, sed estas samtempe bela k grandioza tasko, kiu tiel estas donita al la kreskanta junularo!

La junularo laborista devas esti revolucia laŭ la plej bona senco de la vorto! Ĝi ne devas aprobi la malnovajn aŭtoritatojn. Ĉiuj tradiciaj ideoj devas esti provataj k akurate esplorataj, ili neniam devas senkritike esti aprobataj nur pro tio, ke ili estas transdonitaj de la antaŭa generacio. Per tio ne estas dirite, ke ĉio malnova devas esti forigata k ĉio nova senkritike rekonata — kontraŭe! Ĉiujn ideojn malnovajn kiel ankaŭ novajn oni devas konsideri k esplori, ĉu ili estas konformaj al la interesoj k celoj de la laborista klaso k socialismo.

Tiel estas ankaŭ rilate la seksan demandon. La tuta tradicia stato en la seksaj problemoj, la tuta seksmoralo, kiu konstante valoras por la nuntempa socio, devenas el socioformoj, kiuj antaŭ longe malaperis, kiujn la kapitalista sociaranĝo jam de longa tempo renversis. La kapitalismo, kiu alie supren-malsupren turnis multajn perceptojn k en multaj kampoj, kiu kreis novan moralon konforman al la regantaj sociostatoj, nur en malalta grado provis krei novajn ideojn sur ĉi tiu kampo. Ĉi tie regas laŭteorie ankoraŭ la tradicioj de la kristana eklezio, k ofte tiuj de mezepokaj eklezioj. En praktiko estas neeble sekvi ĉi tiujn tradiciojn, ĉar la sociaj statoj ŝanĝis karakteron. La seksa moralo de l' eklezio ankoraŭ sin plene apogas sur la vira absoluta superrego je la virino, k al la sankto de la edzeco kiel dia instituцio. Tiam la virino fakte estis obeema sklavo de la viro, k preskaŭ ĉiuj maturaj homoj vivis en edzeco. La lasta jarcento plene ŝanĝis la socian staton de la virino k liberigis ŝin en tia grado k amplekso, kiun oni antaŭ 100 jaroj tute ne povis imagi. La ekonomiaj statoj kaŭzas, ke nur la duono aŭ malpli de la seksmaturaj homoj povas vivi en edzeco. Kompreneble seksmoralo, kiu estiĝis en tute aliaj kondiĉoj, ne povas nuntempe esti sukcese konservata. Sed ĉar ĝi konstante estas teorie rekonata, malkonsento inter teorio k praktiko estas sekvo, kiu devige kaŭzas la senliman hipokritadon, kiun oni ĉie renkontas en la nuntempa socio.

Laborista junularo tute ne havas intereson preni sur sin la tradiciajn ideojn de la prapatroj en tiu punkto. — kontraŭe! Estas necese krei tute novajn ideojn, kiuj estas konformaj al la nuntempaj vivkondiĉoj k al la ĉeftasko de la laborista klaso — konduki la socialismon al venko. En socialisma socio la viro k la virino devas tute egaliĝi. La superrego de unu sekso super la alia devas malaperi samtempe kun la superrego de unu klaso super la alia. La klasa diferenco povas esti plene forigata. La seksa diferenco ne povas esti forigata, ĉar ĝi estas destinita de la naturo. Tamen la socia diferenco povas k devas plene malaperi! Sed la laborista junularo, kiu alcelas ĉi-tiun idealon, sekve devas provi efektivigi tion interne de siaj propraj vicoj tiom am-

TRA ESPERANTIO

NIAJ KONGRESOJ

La jaraj kunvenoj ludas gravan rolon en nia movado. Konsciante, ke mi ne diris ion novan, mi tamen kuraĝas peti iom da spaco en "S-ulo" por atentigi la SAT-anaron pri tiu fakto. La kunesto kun fervoraj K-doj, la interŝanĝado de opinioj vekas en ni nekonitan entuziasmon. La interna forto kreskas ĉe individuo k asocio. En la fino de la kongreso ĉiu sentas la malgajon de la adiaŭo. Ĝi atestas pri la karo de la kunesto. Estas kvazaŭ malnovaj, intimaj amikoj disiras, kvankam ni preskaŭ ne konas unuj la aliajn, apenaŭ la nomojn. La konsolo tamen ne mankas. Ĝi memkompreneble troviĝas en la laboro. Fortigitaj per entuziasmo, rekompencitaj por nia tutjara penado per mallonga estado en kvazaŭ utopia, internacia "laborulujo", armitaj per novaj faktoj, ni deziras ekaĝi por la emancipo de nia klaso.

Internen la sukceso de la kongreso estas fakto. Eksteren ĝi *povas* esti tia, se ni atentas pri jeno. La nombro da partoprenantoj ne estas la ĉefaĵo. Pli grava estas la kiel eble plej granda internacieco de la kongreso. Pro tio mi petas konsideri la eblon venigi el *ĉiu lando*, en kiu SAT havas membrojn, almenaŭ unu K-don. Al tiu kvazaŭa reprezentanto liaj samland(urb)anoj finance ebligu veni. Sed ne forgesu interrilatiĝi lin kun la redakcio de laborista jurnalo. Kiam en iu ajn loko en la mondo la SAT-anaro per siaj kunvenoj donas la nerefuteblan pruvon, ke diversnacia laboristaro bone povas interkompreniĝi, tiam en la aliaj lokoj la gazetoj atestu pri tio per artikoloj, kiuj iagrade sentigas la ardon, kiu karakterizas niajn kongresojn. *14 593.*

EL NEDERLANDO

Priesp-aj proponoj en la kongreso de l'nederl. Soc.-Dem. Partio

Jam en la jaro 1928 estis prezentitaj al la kongreso de la Social-Demokrata Lab. Partio (S. D. A. P.) proponoj celantaj la esploron pri utiligo de esp-o por la movado k uzado ĝia en la internaciaj kunvenoj, krom proponoj enmeti en la lab. gazetaro regulan rubrikon pri k per esp-o. La kongreso decidis komisii la Instituton por laborista klerigo (I. v. A. O.) esplori k raporti pri ĝi. En la jaroj 1929 k 1930 la proponoj denove estis prezentitaj, k la I. v. A. O. sukcesis finpritrakti k prezenti sian raporton en la fino de 1930.

Ĉi tiu raporto estas eldonita kiel broŝuro de la presejo "Arbeiderspers" (Laborist-presejo) k estas pritraktota en la nuna kongreso de l' Partio, okazonta je la 5-a k 6-a de aprilo.

La raporto mem esprimas favoron al esp-o, tamen ĝi estas kunmetita de ne-esp-istoj, tion ĉiu lab. esp-isto tuj povas konstati. Ke ĝi malgraŭ tio favoras al esp-o, esprimas la supervaloron de esp-o. Ĝi, bedaŭrinde, ne estas tiel aktuala, kiel ĝi povus esti, k mankas al ĝi raportaĵoj, kiujn ni nepre dezirus menciitaj en ĝi. Pri la holanda esp. laborista movado ĝi nur enhavas malmulte; pri SAT ĝi pli detale raportas, tamen ĝi ne montras perspektivojn. Daŭrigon de la nuna situacio ĝi opinias bona k plenumon de la proponoj efektivigebla. En la okazinta kunveno de l' parti-konsilantaro, kelkaj anoj esprimis sian opinion pri esp-o k pri la raporto, du el ili malfavore, kelkaj aliaj favore.

La kunveno konklude sciis kiel agi laŭ la deziresprimoj k decidis doni "ŝancon" al esp-o en la kongreso. Ni jam sukcesis akiri promeson de la ĉefredaktoro de l' laborista gazeto "Het Volk" akcepti artikoletojn pri tiu temo en la nomita gazeto, kiuj baldaŭ aperos. K-doj, sendu viajn favorajn dezir-esprimojn pri la proponoj multnombre al la sekretariejo de la Social-Demokrata Lab. Partio (Social-Demokratische Arbeiders Party —). Adreso: Al la kongreso de la S. D. A. P., Tesselschadestraat 31, Amsterdam, Holando. Instigu al favora akcepto de la proponoj, montru vian internacian solidaron! Akcepto de la proponoj antaŭenpuŝos nian movadon. Tial konvinku la kongreson pri nia internacia povo! Ne prokrastu, skribu tuj!!

SAT-ano 13 606, Amsterdam.

La Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo (sekr-ejo: Jan van Galenstr. 251-2, Amsterdam-W) sciigas, ke ĝia 16-a Kongreso okazos la 12-an de aprilo 1931 en Roterdamo en "Het gouden Hoofd" (Zeevischmarkt hoek het Hang). Ĝi estas la jubilea kongreso okaze de ĝia 20-jara ekzisto.

Radio

La "V. A. R. A." (Asocio de laboristaj radio-amatoroj) en la kunveno de sia estraro decidis prizorgi regulan disaŭdigon de ĉiusemajna "esp. kvaronhoreto" en kunlaboro kun la Federacio de Lab. Esperantistoj. Laŭ intenco de la Federacio ĝi komenciĝos per vico de 6 lecionoj por progresintoj; ĉar la V. A. R. A. ankoraŭ devas fiksi la programon, kiel eble plej baldaŭ. Per la "kvaronhoretoj" la Federacio ankaŭ intencas disaŭdigi la plej gravajn komunikojn per esp-o.

Atentu do la programon de la V. A. R. A. k sendu viajn konsent-esprimojn al V. A. R. A., postbus 50, Hilversum. Menciu pri aŭdeblo.

LEA-organo

La organo de l' Federacio "Laborista Esperantisto" aperas ĉiudekkvartage k enhavas 6 paĝojn, formato de "S-ulo", eldonkvanto 2500. Redaktejo: Middenweg 226, Amsterdam O.

*

La direkcio de la nederlandaj fervojoj malpermesis al siaj fervojistoj porti insignojn en la dejortempo. Pro tio ankaŭ malaperis la esperanto-insignoj de la uniformoj.

La Federacio de Laboristaj Esperantistoj turnis sin al la direkcio kun petskribo k atentigo koncerne la esp. insignon. La direkcio favore respondis al ĝi k nun permesas al la fervojistoj porti la "verdan stelon". En Holando, do, la fervojistoj esperantistaj dum la dejortempo portas ĝin.

POR LA KONSERVO DE SAT

Al multaj!

Ni ricevis lastatempe diversajn rezoluciojn de rondoj aŭ leterojn de individuoj, kiuj deklaras sian malaprobon al la subfosado de la opozicio. Ni dankas al la K-doj, sed ni jam decidis ne plu publikigi tiajn rezoluciojn por rezervi la paĝojn de "S-ulo" por alia materialo. La K-doj tamen ne pensu, ke ilia faro estis neutila; ni ja bezonas koni la opinion de la SAT-anaro por gvidi laŭ la ĝenerala deziro.

Direkcio de SAT

PRI LA JARLIBRO DE SAT

Multajn demandojn ni ricevis rilate la jarlibron por 1931, ĉu ĝi jam eldoniĝis k kiam ĝi estos eldonata, kiel ĝi aspektas ktp. Ni bedaŭrinde ne povas ĉiun demandon aparte respondi, sed resume respondas ĉi-loke.

Ni trebedaŭras, ke ni ne povis plenumi nian intencon eldoni la SAT-jarlibron

plekse kiom eblas. La duoblan moralon, kiu ankoraŭ estas "bona latino" en la burĝa socio, oni devas akre kontraŭbatali. Tio tute ne okazas en la nuntempa laborista klaso. La malnovaj ideoj fiksiĝis en la sango de pliaĝuloj de la klaso laborista. Sed ĉi tie la junularo devas reordigi. Ĝi havas la kondiĉojn por tio. La gejunuloj de la klaso laborista kreskas kune kiel kamaradoj en laborejo, en organizoj, en sporto. La nova kamarada spirito, kiu ekkreskas en la rilato inter la seksoj, havas la plej bonajn kondiĉojn en la laborista junularo. Ĉiu honorama juna laboristo k laboristino devas konsciiĝi pri tio. (Finota.)

J. H. Leunbach (15 076).

Ĉu vi jam vidis la novan

Sigelmarkon de SAT?

Se ne, vi tuj mendu folion!

Prezo: 1 folio (100 pecoj) nur 0.50 mk. g.

printempe, ĉar, kiel vi scias, nia Asocio troviĝas nun en tre embarasa situacio, pro la reteno de nia mono en la konto de CK SEU. Ni ĉiam esperis k fidis al la promesoj de la K-doj en Moskvo, sed ŝajnas, ke vana estis nia espero, erara nia fido, ĉar nia mono ne estas sendita. Kompreneble sub tiaj cirkonstancoj ni ne povas printempe eldoni nian jarlibron. Ni esperegas, k certe ni plenumos ĝin, fine de la jaro ekspedi ĝin al ĉiuj membroj, kiuj pagis la kotizon por la jaro 1931. *Adm.*

Nur vorton!

La sin mem elektinta stabeto de la Komfrakcio provas atingi per provokaj rimedoj, ke mi konigu la nomojn de la Sovetiaj K-doj, kiuj sciigis al mi pri la faroj de la nuna C. K. de SEU. Vanaj provoj! Mi tamen deklaru, ke *neniam* mi korespondis kun K-do Jakovlev k ke K-do Lidin estas absolute fremda al la informoj, kiujn ni publikigis. *E. L.*

Aŭskultu! Radio Lajpcig!

Okazos parolado pri "20 jarojn Laborista Esp. Asocio por germanlingvaj regionoj" sur ondolongo 259,3 m 1157 kv, la 17-an de aprilo (18-a, horo ĝis 18,25 h. MET). Informojn pri impresoj k aŭskulteblo sendu al: MIRAG, Markt 8, *Leipzig C. 1*, postulante pliajn disaŭdigojn pri lab. esp. movado.

TRA LA MOVADO

KRONIKO

FRANCIO. Marsejo. Dum la vintro okazis du kursoj; afiŝoj, flugfolioj, broŝuroj k revuoj estis elmetataj de tempo al tempo en la legejo de l' marista klubo, kiun vizitas multnombraj migruloj k kie renkontiĝas rugaj maristoj. La gazetoj volonte akceptas niajn artikolojn. — *Vallauris.* Infankurso ĉiutaga kun 12 lernantoj. Unu kurso por plenaĝuloj depost januaro. (Laŭ "Le T. E.".) — *JAPANIO.* Fondiĝis Japana Prolet-Esperantista Unio (JPEU), kiu trovas sian taskon en plenumado de LEA-laboroj en la japania teritorio. Ĝis antaŭ 2 jaroj la tuta movado restis sub neŭtrala influo. En 1929 la nuna "Instituto por Proleta Scienco" okazigis kelkajn sukcesajn kursojn; per ĝia laboro estis kulturata la kampo de prol. esp. movado en Jap. Lastjare en Tokio estis organizata loka grupo de prol. esp-istoj, kiu nun transformiĝis en tutjapanian organizon (18. jan.). — *NORVEGIO. Oslo.* En kvar fakaj unuiĝoj funkcias kursoj gvidataj de aktivaj SAT-anoj. Teksistoj: 18 lern., instruas Magnusson; presistoj: 10 p., instruas Melbye, stratlaboristoj: 18 p., instr. Sundsby, tramistoj: 15 p. Nia societo kunvenas regule ĉiun duan sabatvesperon; ĝi nombras 60 membrojn. Ĉar ni ne bone sukcesis anigi nov-adeptojn al nia komuna societo, ni nun provas fondi grupojn en la div. fakorganizoj. — *Norvik.* Post vizito de hindia propagandisto Sinha vekiĝis intereso por esp-o. En feb. finiĝis kurso kun 58 p. Grupo fondita. (102.) — *SVISIO.* En Ĝenevo okazos la dua kongreso de svisiaj lab. esp-istoj (marto 1931).

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

5 000 000. Verko originala de *S. Grenkamp-Kornfeld.* Formato 12×19; 115 pĝ. Prezo: 3 sv. fk. Eldonejo: Esperantista Voĉo, Jaslo (Pollando).

Grenkamp-Kornfeld estas verkisto tiel bone konata en Esperantujo, ke oni jam ne bezonas lin laŭdi pri lia nova libro. *5 000 000* (legu: kvin milionoj da dolaroj) estas kolekto da rakontoj aŭ noveloj, kiuj rilatas al la moderna vivo k estas ĉiuj interesaj k lerte skribitaj. Nur unu, titolita *Al...*, mi ne komprenis.

La libro sin belaspekte prezentas; ĝi estas bone aranĝita k bone presita. Jen kelkaj eraretoj rimarkitaj: *laŭsorte* (p. 14), *enui* (44), *ŝia amata* (40), *beltempo* (68), *sterni* (108); mi dirus: *lote, enuiĝi, sia amata, belvetero, sterniĝi sur.* Mi notis ankaŭ jenajn novajn vortojn: *humida, amara, heĝo, sminki, psiko, persvadi, rodi, serpo, avanci, trejni, pogromi, gongi, impeto, blufi, nokaŭti, proleto, sino, hurli, svelta.* Ili ankoraŭ ne estas oficialaj, sed plejparte jam tre uzataj. Resume, 5 000 000 estas agrabla, leginda k valora verko. *H. B.*

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

The American Freeman, Girard, 20. 12. 30, Sanktulo eksigita (311).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Le Réveil Ouvrier, Nancy, 24. 2., 28. 2., *Sächs. Arb. Ztg.,* Leipz., 25. 2., *Ruch,* Brno, 27. 1. (mencio de "S-ulo"), *Volksblatt,* Bohum, 2. 2., 10. 2., 17. 2., 3. 2., *Westfäl. Volksztg.,* 3. 2., *Ruhr-Echo,* Essen, 5. 2., *Signalen,* Stokholm, 26. 2. (enhavis trad. de l' ĉap. I el "La Lab. Esperantismo" de Lanti).

NIA POŜTO

Al kelkaj. — La membreco de SAT validas de jan. ĝis dec. dum la kuranta jaro. Post rekotizo la membro fariĝas denove valida, aliel ĝi troviĝas ekster la kadro de la Asocio k ne rajtas uzi la SAT-matrikulon.

Por informo. — La verketo "Karl Marx, Lia Vivo kaj lia Verko", estas elĉerpita.

Voĉdoniloj. — Ili estas nun dissenditaj. Akt. membro, kiu ne ricevis ĝin, senprokraste anoncu tion en la Adm. *Adm.*

KORESPONDADO

GERMANIO

— Mi interŝ. PM kun samideanoj el eŭropaj landoj. Sendu al mi 25 aŭ 50 PM de via lando k mi sendos 50 aŭ 100 pec. de mia lando. Adr.: Curt Hensel, Bäckerei, *Ponitz/Th.*

K-do Friedrich Bertram (21 j.), Waldstrasse 46/IV. m, Leipzig C 1, kĉl, L, PK, PM.

Tramistoj tutmondaj! — Mia nuna adreso estas: Rud. Müller (10 892), Langestr. 63, E. g., *Dresden, A.*

MANĈURIO

— Oficejo de kunligo k Teknika rondeto de loka Politeknika Instituto, koresp. pri fakaj temoj kĉl. Adr.: Politeknika Instituto, *Ĥarbin.*

Kamarad(in)o!

Nova Esperanto-Grupo estos fondata aprilon en Berlin-Moabit. Por pruvi, ke ekzistas esp-o ankaŭ en via lando, vi devas sendi salutleteron aŭ poŝtkarton aŭ esp-ajon. Ĉion adresu: Otto Behrendt (por Moabit) *Berlin NW 40,* Lehrter Str. 36.

Atentu!

Pro kursfiniĝo en aprilo ni aranĝos feston; tial ni petas sendi al ni salutleterojn, il. PK, ktp., por pruvi la disvastiĝon de nia lingvo. Ni garantias resp. per PI. — Konstanta koresp-ado laŭ deziro. Skribu al: K-do M. Reitberger, Alpenrosenstr. 1 b, *München* (Germanio).

ATENTU!

Jus fondita grupo aranĝos la 4. majo 1931 letervesperon. Skribu multnombre! Respondo garantiata! Ĉion sendu al: K-do Heinz Ullrich, Stephensonstrasse 34-a/II., *Dresden* — 45 (Germanio).

Intersteno

la kato (esp.) le jour (franc.) the town (angl.) die Zal (germ.) kyra (rus.)

Por ĉiuj lingvoj la samaj signoj

Koresponda skribo (fundamento) RM 1.—
Rapida skribo (supera ŝtupo) . . RM 1.—
3 aldonoj por po 7 naciaj lingvoj po RM 1.—

Instituto de Intersteno
Friedenstr. 79, Duisburg (Germanio)

Haveblaj ankaŭ ĉe la
ADMINISTRACIO DE SAT
Colmstrato 1, LEIPZIG O 27.

Gek-doj tutmondaj atentu!

Lab. esp. grupo en Saksio serĉas kolektivan korespondadon. Traktotaj estas ĉiuj temoj kun ĉiuj landoj. Adr.: K-do E. Zinke, Pirnaer Str. 33, *Radeberg Sa.* Ni certe respondos!

ATENTU!

Lab. grupo, kiu jus finis kurson por komencantoj, dez. koresp. tre vigle kĉl, L, PK, PI, interŝ. fotojn, ĵurnalojn il. Resp. garantiata. Skribu multnombre! Adr.: K-do A. Kleiner, Altwasser Str. 8/I., *Weisstein b. Waldenburg*/Silezio.

ENHAVO

	paĝo
Unujara ekzekutlaboro de finlandaj Lappo-faŝistoj	201—02
Kiel la nuna ekonomia malviglo efikas sur la instruistan vivon en Japanio	202—03
Senlaboreca asekuro	203—04
La klasbatalo tra la mondo	204
Tagoj el mia fraŭla vivo	204—05
Necesas objektiveco	205
Diverskoloraj okulvitroj	205
Mi volas scii	205
Por nia medito	205
Por nia distro	205
Junulara Paĝo	206—07
Tra Esperantio	207—08

Presejo: Neudrag, Leipzig (Germanio)